La sekretario LEEN sciigas ke la flandroj, kiuj partoprenos la kongreson LEEN kaj ne disponas pri sufiĉe da guldonoj, povos ricevi ilin en Nederlando, pagante la oficialun kontraŭvaloron ĉi tie.

Eventuale turnu vin al nia kasisto: S-ano A. De Keyser, Buskruitstr. 23 Brussel.

XIV-a Kongreso F.L.L.E. GENT, 4-6 de junio 1949

TRIA KOMUNIKO

La konsisto de la Komitato: Ges-anoj Drs Mortelmans, Van Neste, Terrijn, D'Hainaut, Van Halter kaj De Boes.

Skribu al: S-ano De Boes, Clementinalaan 31.

Pagu al: S-ano Van Halter; St. Michielsplein 8 — Poŝtĉekkonto, n° 4832.56

Kongreskotizo: 50 fr. po persono. Ni insiste petas ke tre multaj jam nun faru la giron al S-ano Van Halter.

Glumarkoj kongresaj: ili estas haveblaj je 20 Fr. por 100. Nepre mendu tuj kvanton: vi propagandu Esperanton, gluante ilin sur viajn korespondadojn; vi konigu nian kongreson kaj... subtenu la laboron de la O.K., plenigante ĝian kason!

Apartaj kunsidoj: Tiucele la L.K. povas disponigi ejojn (ekz. por F.E.I., UEA, instruistoj ktp). Oni jam nun turnu sin al la sekretariejo.

GENT — LA URBDOMO.



La urbdomo estas aro da konstruaĵoj el diversaj epokoj:

1. — Konstruaĵo el 1481: nevidebla de el la ĉirkaŭantaj stratoj kaj en kiu estas la Urbkonsilantarejo kaj la salono nomita Arsenalzaal.

2. — La Gotika parto (1517-1565) kiu estas belega gotika (3a periodo) konstruaĵo. Se tiu parto estus finkonstruita, Gent estus havinta la plej belan gotikan urbdomon de la lando.

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. — Afdeling Antwerpen — Op 12 Maart e.k. geeft de afdeling een bal in de Nieuwe Carnot, Carnotstr. 60; tombola en andere attracties zijn voorzien; al onze vrienden uit Brussel, Mechelen, Gent en elders worden uitgenodigd. Eerstdaags verzorgt de heer Vermuyten ons weer een aangename en leerrijke voordracht.

Het programma Maart luidt: 2-3, Kantvespero; 9-3, diversajoj; 12-3, ballo; 16-3, parolado; 23-3, gramatiko; 30-3, krucvortoj.

V.E.B. — Afdeling Blankenberghe. — Regelmäßig vergadering iedere Woensdag; in de club vinden 2 cursussen plaats, een voor oude leden onder leiding van de Voorzitter, Dr. Couwenberg, en een voor gevorderden (afdelingsleden die reeds een cursus voor beginners hebben gevolgd) onder leiding van de secretaris. Op 15 December werd de traditionele Zamenhofdag gevierd; smake-lijk avondmaal, verloting van boeken en vrolijke liederen. Ieder lid kreeg te dier gelegenheid een verrassing; Mej. Popelier droomt nog van het wonderschoon geschenk dat zij ontving.

V.E.B. — Afdeling Gent — 25-1: Lezing over het vraagstuk der atoomsplitting door Dhr. R. De Schepper; 12-1: oefeningen uit Flandra Esperantisto; de derde Woensdag: lezing en voordracht; op 26-1: jaarlijkse algemene vergadering met kiezing van het bestuur: Drs. Mortelmans (Voorz.); Dhr. De Boes (onder-voorz.); Dhr. Van de Velde (Secr.); Dhr. Vanneste (Schatbew.); Dhr. Van Halter (Feestbestuurder); op 3-2: lezing door Dhr. Vanneste over het postzegelverzamelens; tevens liet hij de merkwaardige verzameling bewonderen. Alle leden V.E.B. worden dringend verzocht de vergaderingen regelmatig bij te wonen.

V.E.B. — Afdeling Mechelen: — Gedurende de maanden Januari en Februari 1948 vonden de vergaderingen regelmatig plaats, onder de gewone belangstelling.

La Verda Koro wordt verder bestudeerd en over afzienbare tijd zal de laatste les onder ogen genomen worden; er zal dan met gemeenschappelijke studie en lectuur overgegaan worden van een ander te bepalen werk.

De Mechelaars zullen talrijk deelnemen in het feestje dat de Antwerpenaars inrichten op 12 Maart e.k.

3. — La renesanca konstruaĵo (1595-1621) kie estas videblaj la tri specojn de kolonoj: Dorikaj, Ionaj kaj Korintaj.

Vizito al la urbdomo ebligas konatigi kun ĝiaj diversaj salonejoj kaj iliaj ornamadoj ĉiuspecaj kaj kun aro da pentraĵoj historiaj.

Plie en la Pacificatie-salonego estas memorajstono pri la Pacificatie van Gent, kontrakto kiu, en 1576, finigis la religimilitojn en la Nederlando. Rimarkindaj estas ankaŭ ĝia labirinta pavimo kaj murpentritaj blazonsildoj de la Grafoj de Flandrujo kaj, en frisornamo, tiuj de la multegaj posedadoj de Karolo, la Va.

SONORILEGO ROELAND (*)
Albrecht Rodenbach.

Jen super Gent en la silent' Belfrido, antikva simbolo. Pri nuna Gent malĝojas mi grandega morto sen parolo. Subita kri', ekvokas ĝi per bronza voĉo al popolo: « Trilu en tomb' Gentaj herooj vi Jan Hyoens, vi Arteveldeoj Sonas pro brulo, mi Roeland kaj pro tempest' en Flandroland'.

Kolora mont' eĉ de l'horizont' aperas kun la Gentaj filoj. Ekvidas mi malnovan Gent, kuras popolo al armiloj. Land, en mizer'. Por flandra ter' sin armas la gildanaj miloj. « Jen Jan Hyoens, jen Artevelde. Ek al batal', filoj de l'Skelde, sonoras stormon nun Roeland, sonas pro storm' en Flandroland'.

Giganta son', heroo ton' atestoj de belega gloro. Vi, bronza kant', nun tra la land' riproĉa plendo de doloro. Sed flandra sun', levigis nun, ne estas tempo plu por ploro Flandra leon'! trilu turego kaj akompanu nin en ĥoro, kantu: « Sonoras mi, Roeland, estas triumf' en Flandroland'!

(*) elparolu: Ruland.

DE PERS OVER ESPERANTO

In Januari 1949 vonden wij het volgende in de pers:

1. Aankondiging van Esperanto kunsussen: in 3 vlaamse dagbladen.
2. Aankondiging van Esperanto werkvergaderingen: in 7 franstalige en in 6 vlaamse dagbladen.
3. Aankondiging van Esperanto-Kongres te Brugge: in 7 vlaamse en in 7 franstalige dagbladen.
4. Allerlei mededelingen betreffende Esperanto: in 2 franstalige en in 2 vlaamse bladen.
5. Aankondiging van voordrachten in Esperanto: « Over Bijenteelt »: in 3 franstalige en in 2 vlaamse dagbladen.
6. Aankondiging van een Esperanto-Kongres te Gent: in 3 vlaamse dagbladen.
7. Artikels: « De sleutel is er »: uitgebreid en interessant artikel ten gunste van het Esperanto (in de « Roeselaarse Werkbode »).
8. Rubrieken: a) Wereldberichten (in de « Neue Berner Zeitung »); b) « Het Hoekje van de Esperantist » in « De Natuurvriend »; c) een Esperantokursus (in nr. 6 van « Energy »).

Radio.

Ni atentigas la gesamideanojn el ĉiuj landoj, ke Radio-Sofio dissendas esperantlingve ĉiumarde kaj ĉiuvendrede je la 20.50 horo orienteŭropa tempo aŭ 19.50 horo normala mezeŭropa tempo, sur la nova mallonga ondo de 39.11 metroj prelegojn pri la socia, kultura, ekonomia kaj politika vivo en nova demokrata Bulgario.

Ni petas la samideanojn, post la aŭskultado, skribi multnombre al Radio-Sofio — esperanta emisio, Sofia, Bulgario, pri siaj impresoj de la prelegoj kaj konigi al ni siajn sugestojn kaj dezirojn, laŭ kiuj ni klopodos plibonigi la enhavon de la disaŭdigoj. La leteroj ricevotaj havos ankaŭ alian tre gravan signifon. De ilia nombro dependas la plioftigo de la Esperanto-dissendoj, kiujn ni esperas povi fari ĉiutagaj. Tio dependos nur de la aktiveco de la esperantistoj tutmondaj.

La alilandaj radioparolantoj en esperanto estas petataj skribi al ni por intersaĝo de sperto.

Een vruchtbaar jaar voor de V.T.B.

1948 was bijzonder vruchtbaar voor de Vlaamse Toeristenbond. Hij won meer dan 5200 leden bij, wat de nettowinst sedert begin 1947 of 7.000 brengt.

Vooral de grote Vlaamse steden werkten krachtig mee: alleen in de stad Antwerpen (zonder de voorsteden) noteerde de V.T.B. 1500 nieuwe toetredingen; te Gent waren het er 1100.

« De Toerist », zijn halfmaandelijks orgaan, nam, op beter papier, een zeer aanzienlijke uitbreiding, wat het aantal bladzijden betreft, zonder nochtans in prijs te verhogen, wel een unicum! Bijzondere nummers werden gewijd aan Kongo (48 bladzijden), Genk (40), West-Vlaanderen (48) en de Boerenkrijg (40).

Er verschenen V.T.B.-gidsen voor Gent (in de reeks « Steden en Landschappen »), Kasterlee en Westerloo, een Rubensgids voor de Antwerpse kerken, een prachtig plaatwerk « Frans-Vlaanderen in woord en beeld », de tweede uitgave van een wandelboekje voor het Jakob Jordaenspad (Antwerpen-Putte-Grens), een kunstkalender, een fotografisch handboek voor beginners. Ter perse zijn de eerste drie delen van een nieuwe V.T.B.-reeks: Noors, Deens en Zweeds voor de Toerist. Op 1 November begon een toeristische cursus te verschijnen, de eerste in zijn aard in België. Bestendig werd gewaakt op het Vlaams toeristisch kapitaal aan natuur- en monumentenschoon. In elk nummer van « De Toerist » kon men de echo vernemen van een voortdurende strijd voor de herstelling van kerken, kapellen en burgerlijke monumenten, voor het behoud van molens, voor het ongeschonden bewaren van boom en bos enz. Ook naar de verbetering van het Belgisch wegnat, naar betere trein- en tramregeling, naar taal- en cultuurbelangen op eigen gebied ging de voortdurende aandacht.

De sterke groei verplichtte de V.T.B. zijn personeel in het Antwerpse hoofdkantoor en in de vijftien bijkantoren, van Veurne tot Genk, aanzienlijk te vermeerderen.

Op 17 Oktober werd het geheel gemoderniseerd bondsgebouw, met modelkantoren, met een gans nieuwe feestzaal en met een gespecialiseerde toeristische boekhandel, plechtig geopend.

Vele tientallen meerdaagse bondsreizen gingen door, ongeveer driemaal zoveel als verleden jaar, naar de Ardennen en het Groothertogdom, naar Nederland en Frankrijk, naar Zwitserland en Italië, naar Oostenrijk, Zweden en zelfs naar Portugal. Een fietstocht door dit laatste land, met 19 deelnemers, wekte er niet weinig opzien!

Boottochten naar Zierikzee en elders in Nederland verenigden een paar duizend leden. De bezoeken, wandelingen, fietstochten, tram-, trein- en autocarreizen, vliegtochten, over gans België, evenals de toeristische voordrachten en filmvertoningen, door tientallen zeer actieve afdelingen, in de vijf Vlaamse provincies ingericht, maakten te zamen een indrukwekkend getal uit, dat tot in de duizend oploopt.

Het aantal ingerichte privaatreizen nam zeer sterk toe, evenals dat van de groepsreizen, die werden georganiseerd voor scholen, verenigingen en zelfs firma's.

Steeds meer toeristische en handelskortingen worden in binnen- en buitenland aan de V.T.B.-ers verleend.

Verskillende wandelpaden, sommige tot 80 Km. lang, werden bestudeerd en beschreven; ze worden aanstaande zomer geopend. Zogenaamde « toeristensmarsen », van 20 en 30 Km., leidden honderden leden, in alle Vlaamse streken, naar de minst bekende natuur- en kultuurmonumenten.

De « Vlaamse Vereniging voor Water-toerisme » (V.V.W.) was te Antwerpen zeer actief en gaf eigen « Tijdingen » uit. Dit was ook het geval voor de Jeugdafdeling, die vooral in de Scheldestad en te Brugge flink van zich liet horen.

De foto- en kino-afdelingen richtten cursussen in en een tentoonstelling, gaven een handboek uit voor de beginnende-fotograaf en maakten smalfilms van enkele reizen en uitstappen. De kampeerafdeling « Vlaamse Kampeertoeristen » vestigde haar sekretariaat te Gent en is weer in volle ontwikkeling. Over de Vlaamse Automobilistenbond verscheen een afzonderlijk verslag.

De Vlaamse pers stond de V.T.B. flink ter zijde, terwijl hij geregeld propaganda kon maken voor het toerisme in ons land, langs de zenders Antwerpen, Gens, Kortrijk en Hasselt.

De betrekkingen met verscheidene ministeries, met de Vlaamse provinciebesturen, met talrijke gemeentebesturen in Vlaanderen en Wallonië, worden steeds drukker en vruchtbaarder.

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

La PREMION gajnis post n-roj 55-56: s-ano R. Iserentant el Brugge.

SOLVOJ.

N-ro 56. HOR. — 2. iluzi; adapt. — 3. mil. — 4. stamp; rostr. — 5. ar; um. — 6. apotekist. — 7. ist. — 8. dren; vibr. — 9. arb. — 10. prujn, anonc. — 11. sel.

VERT. — 1. fiksa; adopt. — 2. tra. — 3. hura; plenum. — 5. simpati; ans. — 6. estr. — 7. malrekt; bal. — 9. taks; scivol. — 10. tut. — 11. storm; graci.

N-ro 57. HOR. 1. aplik; minac. — 2. oka. — 3. esper; idiot. — 4. edz. — 5. mola; kapt. — 6. pelt. — 7. star; kant. — 8. bongust. — 9. glob; oleo — 10. eta. — 11. trink; nesto.

VERT. 1. seg. — 2. pasport. — aboni. — 4. aprob. — 5. kore; ek. — 6. delegit. — 7. maiz; an. — 8. kokso. — 9. atlas. — 10. akompan. — 11. teo.

N-ro 58. HOR. 1. kroat; propr. — 2. Ivo. — 3. sterk; liver. — 4. lav. — 5. kver; fabl. — 6. april. — 7. aĉaj; istm. — 8. kanguru. — 9. erco; traf. — 10. aii. — 11. CEZAR; deriv.

VERT. 1. ale. — 2. Rotkviĉ. — 3. akciz. — 4. rajao. — 5. tikl; ar. — 6. akriĝil. — 7. polv; id. — 8. flirt. — 9. surir. — 10. piedbat. — 11. muf.

N-ro 59: KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. inklino fari ian agon, akirita pro ofta ripetado de tiu ago (R); oni trovas ĝin en ĵurnalo (R). — 2. grupo. — 3. delikate kaj ame tuŝeti (R); iri, transportate per aŭtomobilo (R). — 4. malplenaĵo (R). — 5. korpoparto. — 6. ĝi suĉas dolĉaĵon el floroj (R); frukto. — 7. ne pli ol; knabinoj ludas per ĝi (R); trinkaŝo el fruktosuko (R). — 8. parto de longa vorto (R). — 9. oni uzas ĝin por kudri (R); ĝi havigas al ni varmajn tagojn (R). — 10. nombro. — 11. areto da amikoj; vojaĝante, ni kunportas ĝin (R).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											

Vertikale. 1. ekzotika grasa planto, ankaŭ ofte trovebla en niaj domoj (R); membro (R); ne ĉi tie. — 2. klavo de piano ofte estas tia. — 3. bongusta bakajo (R); parteto (R); havigi al iu

VIRINO KAJ AĜO

Ekzistas nenio pli necerta, ol certa aĝo virina.

Virino kvardekjara al tridekjara pardonas ĉion, nur ne la dek jarojn.

Virino, kiu tro longe restis tridekjara, finfine fariĝas ne tridek-unu-, sed kvindekjara.

Por malkovri la aĝon de virino, oni unue demandu ŝin mem, poste ŝiajn amikojn kaj oni certu ke la vero — kiel kutime — kuŝas en la mezo.

Neniam oni diru al virino ke ŝi aspektas pli maljuna. Unue, ŝi scias tion ja plej bone, kaj due, ŝi ne volas scii tion.

La jaroj, kiujn virino subtrahas de sia aĝo, neniam perdiĝas. Ŝi aldonas ilin al la aĝo de siaj amikinoj.

Knabinoj ĉirkaŭ la dudeka, kiuj serĉas edzon, demandas: « Kia li estas? ». Inter la dudeka kaj tridekkvina: « Kio li estas? » kaj je la kvardeka: « Kie li estas? »

Ie legita trad: Piked.

Postrestaĵoj

Jes, vi foriris... Kaj nenio restis
Tie ĉi, ĉi tie, kie vi estis:

Sole sur kelko da flavaj paperoj
postvivas kelkaj malgrandaj literoj.

Kiujn per via propra man' vi skribis,
kiam vi tie ĉi ankoraŭ sidis.

Kaj mi unu ilin malgaje okulas,
morda funebro min tute saturas,

kaj tiuj ĉi literoj estas por mi
statuo ĉe kiu mi volus dormi.

Karolo Piĉ

(R). — 4. konjunkcio; konjunkcio. — 5. estro (R); nazo, fingro, kudrilo havas ĝin. — 6. multaj troviĝas en la gramatiko (R). — 77. debutanto (R); neagema (R). — 8. sufikso (R); prefikso. — 9. io traridebla kaj rompigema (R); ĝi estas trovebla en birdonesto (R); kontraŭo (R). — 10. en afabla maniero. — 11. plejble serioze aserti, ke oni diras la veron; sufikso (R); onidire, ĝi ne estas sen dorna (R).

N-ro 60: EL DU FARU UNU.

Intermiksi la literojn de ĉiu duo da vortoj, por formi novan.

Legante la unuajn literojn de la novaj vortoj, oni trovas konatan proverbon.

1. baki - reno. 2. ledo - rando. 3. boje - lui. 4. rana - peti. 5. lerta - naŭ. 6. acido - tri. 7. nura - veto. 8. hoko - peti. 9. muro - fino. 10. glita - sono. 11. teni - gladi. 12. rana - rido. 13. li - gajnanto. 14. vane - etula. 15. nome - gaza. 16. io - facila. 17. picea - truo. 18. tordi - kato. 19. aŭ - kanteti. 20. segi - tusi.

Sendu la solvojn antaŭ la 20-3-1949 al jenaj adresoj: POSTBUS 342 (Enigmoj). BRUSSEL, por anoj de Flandra Ligo; S-ro Teunissen, Legmeerstr. 37. A. 1. AMSTERDAM West, por abonantoj de Nederlanda Esperantisto.

ANONCETOJ

Japana samideano SIBASAKI — J. (38-jara), 905 Ŭadahonmaĉi Suginamiku, Tokio, deziras korespondi pri diversaj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Deziras kontakton kun belga biologo aŭ fiziologo por interŝanĝi novaĵojn pri biologiaj rondoj la 33-jara ĉelo-fiziologo YUKITO K. OOTA, Nisimati -342, Tottori, Japanujo.

Serĉas geamikojn por korespondado pri ĉiuj sciindaĵoj, Wilhelm Otto, muzikprofesoro, (20 b) Holzminden, Anden Teichen 17/1 Germanujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, Sro KAZUMI — HURUKAWA, Hukiage Nakabasisuzi 7, Wakayama-si, Japanujo.

Deziras korespondi, speciale kun kuracistoj, medicinaj studentoj, flegistinoj aŭ akusistinoj. 34-jara kuracisto Sro DOI-MORIO, Kaĉo-hospitalo, Ŝimono-Noda-mura, Nagaoka-gun, Koĉi-Ken, Japanujo.

J. LOPEZ HERRERO, Conda Penalver 52 MADRID — Hispanujo, deziras korespondi kun flandroj pri fotografado, pentrado kaj artoj.

Ceĥa samideano Robert Opletal (26-jara teknikisto; ĝarden-kaj fotoamatoro), Komin Hlavni 1, Brno, Ĉsl., deziras korespondi kun nederlandano.

La Turisma Fako de la Nov-Zelanda Registaro sendos senpage al eblaj turistoj serion da belaj fotoj kun Esperanta teksto por montri, ke Nov-Zelando estas elstare vizitinda lando.

Nepre skribu al: « Department of Tourist and Health Resorts, Wellington, Nov-Zelando ».

SONAS GAJA MELODIO

Kia bona hor',
Kiam en la kor'
Sonas gaja melodio.
Gojas homa kor'
En la bela hor'
De gajiga harmonio.

En modesta dom'
De bonvola hom'
Sonas gaja melodio.
Ĝuas vivon li
Kun amata ŝi
En gajiga harmonio.

Tra la vasta land',
Esperantoland',
Sonas gaja melodio.
Sub la verda stel'
Al komuna cel'
En gajiga harmonio.

Nora Dover.

AL MIA PATRINO

verkis: E. Claes
el la flandra: Dirk.

« Ĉi tiu tempo estas tempo de granda sufero patrino. »

Nun mi scias, Patrino, ke ĉiun tagon de la nuna printempo vi staros antaŭ nia malnova domo kaj, trans la ĝardenheĝon, esploros la vojon, laŭ kiu vi posttrigardis min.

Nun mi scias ke, humila kaj rezignema, vi fikse kaj fore rigardas per okuloj, dolĉaj kiel ĉi tiu vespero, trans vojojn kaj kampojn, kaj homojn kaj tempon, kaj ke vi vidas min kiam mi ĉi staras, senigita de ĉio kio vi ne estas, la Nuro integra kaj sankta. Kaj ke via tuta estaĵo, en mirinde granda amo patrino, ŝvebas al mi kaj ĉirkaŭ min, noktojn kaj tagojn, noktojn kaj tagojn, eternegan tiun tempon.

Nun mi scias viajn blankajn manojn interplektitaj, en ripozo pia, sur via nigra robo, vian belan grizan kapon ete klina, kvazaŭ aŭskultanta foran sonon, sur la dezerta vojo paŝon, kiu parolis al via koro, kaj kiel laodoro de siringoj kaj kratagoj, de glicineoj kaj sambukoj ĉirkaŭas vin kaj la domon silentan. Nun ĉio majverdas tie kaj la folioj de aŭkubo kaj evonimo, de hedero kaj ilekso kaj aralio britas de feliĉo nova Silento kuŝas ĉirkaŭ nia domo kampara kaj ŝirmas ĝin kiel sanktejon forgesitan kaj forlasitan, kie floras la floroj kaj kantas la birdoj kaj kie vi atendas min.

Nun mi scias, Patrino, ke vi portas mian bildon en la tabernaklo de via animo, kaj ke ĉirkaŭ vi vivas la pasintaj tagoj...

...kaj staras nun kaj atendas, kun viaj kvietaj, bonaj okuloj patrini kaj via klina griza kapo, aŭskultante ĉu ja ne sonas paŝo sur la dezerta vojo.

Nun, kiam la vespero, soleno de benaj manoj, falas sur kampojn kaj paŝtejojn, kaj plantoj kaj floroj kliniĝas al la kvieto de la malnova domo kaj vesperpreĝe venas la silento, — nun vi turnas viajn okulojn for de l' vizaĝo de l' aĵoj, kaj vi fiksas la rigardon en la profundan profundon de via propra koro patrino. Jen vi repaŝas la sojlon en la intiman privaton de la domo. Ĉiun movon de viaj manoj mi vidas, kaj scias mi kien vi direktas viajn paŝojn kaj via iro trankvila pleniĝas la tutan ĉambron per la spirito, kiu nun vivas en ĉiuj aĵoj kiuj enestas ĝin. Mi vidas kiel vi faras ĉiun geston kun maljunaĝa kvieto kaj nun via pala vizaĝo kvazaŭas la figuron de la malnova domo.

En la rozeca lumokrono, kiun la lampo rondigas sur la tablo, mi vidas vian klinan kapon, viajn grizajn harojn kaj blankajn manojn ripozantajn sur la tablo, izololacajn.

Patrino, kiom vi maljuniĝis. Ĉu tiel longis tiuj tagoj, ke grizaj iĝis viaj haroj, kaj tiel lacaj viaj trajtoj, tiel lacaj...

Ekstere jubilas la majnokto en la plenebrio de sia junfeliĉo.

Mi trankvilu nun kaj trarigardu la helon de ĉi tiu vespero al via bildo, ho Patrino mia, kiel al la bildo de sankta Mario, kiam mi malgrandis.

Mi trankvilu nun kaj venos en mian kapon neniŭ penso kaj en mian buŝon neniŭ vortoj; mia pleja intimo kuŝas nun en miaj revperditaj okuloj, respektoplenaj, kaj kiam mia buŝo diros vortojn, ne sentos mi movon de preĝaj lipoj miaj kaj ne aŭdos mi sonon de vortoj.

Nun estas mia tuta estaĵo, nun ĉio kio mi estas kaj estos, en piaj miaj okuloj, kiuj tiel heligas ĉi tiun vesperon ke mi vidas vian klinan kapon kaj sentas vian ĉeeston.

La mirinda sekreto de nia pleja intimo portas vin ĉe min kaj min ĉe vin, ĉirkaŭvolvas kaj perfortas min. Patrino... Ĉu jen vi? Kaj ĉu jen la brilo de viaj okuloj kaj jen la kareso de viaj manoj? Ĉu vizaĝ-al-vizaĝe mi vidas vin? Kaj ĉu vian voĉosonon aŭdas mi?

Ĉu tagas nun? Ĉu forgesita ĉia pasinteco kaj ĉu ĉio ree bona? Kaj kiel do vi aliris min, Patrino, kaj kiel mi paŝete flankas vin kaj vi rigardas min per la antaŭa rigardo? Vidu, la floroj klinas al ni siajn vesperkalikojn, la mal-lumo similas veluran vualon, kaj najtingalo kantas la kantikon de l' amo. Ĉu okazis io en la aero aŭ surtere? — Ĉu tia vi estas, tia mi estas ĉe vi, kaj tiel interparolas ni senvorte, tia la vespero ĉirkaŭ ni kaj tia en ĝi ĉiuj aĵoj? Ĉu miraklon okazigis nia amo? Aĵ... Patrino, ĉiam restu tiel...

La animoj kreigiĝis el nokto. Nokto estas la esenco, la senmorta vivo ĉiama. La hela tago estas por la ekstero, la mal-luma nokto por la interno. Nokto estas la animo. Tiam pli bonas kaj pli belas la homoj. La nokto estas la misterplena vizaĝo de la bildoj, kiujn ni perceptas kaj deziras kaj ne scias. La tago estas la revo, la nokto estas la realo.

Ĉirkaŭe de ni parolas la voĉoj de la nokto, — kaj estas la Morto, kiun ili parolas. Ĉiutage kaj ĉiunomente ĉiutage ĝi estas apud ni kaj ĉirkaŭ ni. Intime ni konas ĝian bildon kiel delongan konaton, kaj la frosta premo de ĝia mano ne plu tremiĝas nin. Ni konas ĝian iradon kaj konas ĝian vorton kie ĝi mute gestas kaj ordonas. Ni estas la izolitaj malĝojaj infanoj, la « Infanoj de la Morto ».

La voĉoj de la nokto parolas pri la malĝoja Morto.

Unu antaŭ alia ili iras, sekvas ĝian voĉon, unu antaŭ alia, unu post alia. Kluj staris ĉi antaŭ ni, ne plu estas, ne plu estos ni kiam venos la aliaj. Kaj ĉiuj ili kuŝos en la tero laŭ la vojoj kaj ŝoseoj de ĉi tiu ebena lando de Flandrujo, kien ili venis por ĝin renkonti. Tiel ili belas, mortaj; mi vidis multajn vizaĝojn, kvietajn kaj rezignemajn, kiel se ili trovis tion malgrava kaj sciis ke estos tiel. Ĉiuj ili kuŝas ĉi en la tero kaj iliaj mal-varmaj lipoj kisas la grundon sur kiu ili staris, — kaj nun parolas al ili la voĉoj de la nokto, iras kaj revenas ĉe ĉiuj krucoj laŭ la vojoj kaj ŝoseoj... Mirindaĵoj!

Kiam la voĉoj de la nokto parolos al mi, kiam mi tie kuŝos, Patrino, sankta Patrino mia, tiam venu ja ĉiuvespere kiel ĉi tiun vesperon kaj klinu vian vizaĝon al mi.

Klinu vian vizaĝon al mi kaj interplektu viajn blankajn manojn sur la brusto kaj tute mallaŭte diru: « Mia bona knabo », tute mallaŭte ke neniŭ alia audu ĝin, kiel vi faris antaŭ tre longe.

Mi tion aŭdos, Patrino, kaj mi vidos viajn okulojn tra la nokto, kiel mi vidas ilin nun.

Kaj ĉiuvespere kisu la mizeran krucon kiu, kiel malriĉa almozulo, indikas kie mi atendas vin. Estas ĝi el kruda, nerabotita ligno, sed mia nura ordeno ĝi estas.

Memoraje prenu manplendon de la nigra grundo, kiu kovras min, kaj diru: « En la nomo de la Patro kaj de la Filo kaj de la Spirito Sankta. »

Patrino, oĥ... Tiel volontege mi estus ĉe vi.

Scias mi ke ja ĉiuvespere de la nuna printempo vi staros antaŭ nia malnova domo kaj esploros, trans la ĝardenheĝon, la vojon laŭ kiu vi posttrigardis min.

Majmonate en la tranĉeoj 1915.

(El « Oorlogsnovellen »)

Kun afabla permeso aŭtora.

Notoj: aralio: aralia chinensis.
aŭkubo: aucuba japonica.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel — Drukkerij: J. Van Laer, Korte Begijnenstraat 38, Turnhout.